

LINGVO INTERNACIA

GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA JE LA NOMO DE L' KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por la jaro 1899:

Skandinaviaj kronoj 2,00 = germanaj markoj
2,25 = frankoj 3,00 = rubloj 1,00 = portu-
palaj rejsoj 500 = brazilaj rejsoj 1000 =
aŭstro-hungaraj kronoj 2,75 = cendoj 60
= ŝilingoj $2\frac{3}{12}$.

Pago por anoncoj:

15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. 10 %
rabato por duonjaraj. 25 % rab. por tut-
jaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ
pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: *Paul Nylén, Upsala, Sverige* (Svedujo).

Adreso de la administrado: *Ekspedejo de Lingvo Internacia, Luleå, Sverige*
(Svedujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro.

Pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la
Ekspedejo.

N:o 1 (37)

la 25:an de julio 1899

IV:a jaro.

*La literoj akcentitaj, kvankam antaŭ longe menditaj por la nova
presejo en Luleå, ne venis ĝustatempe; tial post kelka atendado tiu ĉi
numero estas presita en nia ĝisnuna presejo en Upsala.*

N:on 1 ni elsendas al ĉiuj malnovaj abonintoj de 1898.

Red.



Unu vorto ĉe la revido.

Nia gazeto dum la lastaj monatoj staris dubante ĉe disvojaĝo, kie ĝi
devis elekti inter du vojoj; unu brako de la voja konigilo montris al ĉeso,
la alia do al daŭrigo.

Ni nomis en la antaŭa numero la kaŭzojn, kiuj devigis al tia elekto.

Ili estis parte tio, ke la gazeto perdos sian ĝisnunan ekonomian apogon
per tio ke ĝia mona mastro trovis necese sin retiri; parte la malfacilaĵo por
ĝia redaktoro daŭrigi aŭ trovi ian sekvulon.

Nun tiuj ĉi ambaŭ malfacilaĵoj estas forigitaj, per tio ke unu sveda
esperantisto prenis sur sin la zorgon por la ekonomio de la gazeto kaj ke la
malnova redaktoro trovis eblon restadi.

La gazeto iradas tial antaŭen sur la vojo de daŭrigo.

En la novaj cirkonstancoj nun aperantaj, ni devas fari unu kaj alian
ŝanĝon por sekurigi la ekzistadon de la gazeto.

La eldonado estos tiel aranĝita, ke en la nuna jaro aperos 12 numeroj
po ok paĝoj, unu en la komenco kaj unu en la mezo de ĉiu el la ses lastaj
monatoj de la jaro. La kosto abona por tiuj 12 numeroj estas 3 frankoj.
Ni esperas, ke la amikoj de l' gazeto estos kontentaj je tiu ĉi aranĝo. Jam
multfoje diversaj personoj esprimis la deziron, ke la gazeto eliradu pli ofte.
Nun ni provos, kaj se la provo donos bonan rezultaton, ni daŭrigos ankaŭ
en la jaro venonta eldonadi ĝin dusemajne. Tiujn, kiuj havas eblon, ni petas

aboni per la poŝto, kaj liveri al la Ekspedejo per poŝta karto ilian nomon kaj adreson per enmeti en la adresaro presota en la gazeto. Iam rabato ne povos, kiel en la pasinta jaro, esti donata al kluboj, — la plimulto de la abonantoj estas membroj de ia klubo esperantista.

Alia afero de signifa graveco por la mona stato de la gazeto koncernas la demandon pri anoncoj.

Tiu ĉi afero estos de nun multe pli zorgata ol iam. Kaj ni turnas nin pri tio ĉi al niaj amikoj en diversaj landoj kaj lokoj, petante ilian helpon. Ni akceptas kiel anoncajn kolektistojn tiujn personojn, kiuj deziras esti niaj helpantoj pri tio. Jen niaj anoncaj kondicoj kaj kostoj: 15 ŝt. = 20 centimoj por ĉiu duonpaĝa petitlinio, kun rabato da 10 % por duonjara anonco, kaj da 25 % por tutjara; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento. Anonca agento ricevas kiel salajron 10 % de la anonca sumo.

Se la anoncado eble plimultiĝos kaj cetere kaŭzo sin prezentos, ni metos apartan folion enhavantan pli-malpli da anoncaj paĝoj kiel kovrilon, en tia maniero ke ĉiu numero donos 8 paĝojn da teksto sendepende de la multo da anoncoj.

Tiuj personoj, kiuj volas en tio helpadi la redakcion, havu la bonecon raporti sin kiel anoncajn agentojn ĉe la Ekspedejo de l' gazeto en Luleå.

Ni esperas la plej bonan rezultaton de tiu ĉi aranĝado.

* * *

Tuŝante nian programon kaj la manieron de nia agado, ni diros nur, ke tiuj rilatoj irados en tiu sama spirito kiel ĝis nun dum la ekzistado de L. I.

Ni ripetas do tion, kio estas jam akcentita per la komencaj vortoj de la prova numero de tiu ĉi gazeto en decembro 1895, ke *la celo de nia gazeto estas vastigado kaj prilaborado de la lingvo internacia Esperanto*.

Por penadi atingi tiun celon, ni intencas, post kiel ĝis nun, restadi for de tiaj demandoj, kiuj povus kaŭzi ofendon kaj diskonsenton. En tion ni kalkulas ĉian subjektivan sinmikson en politikaj kaj religiaj demandoj. Por tiaj aferoj ekzistas alia juĝejo.

Niaj malnovaj fidelaj amikoj konas per la antaŭaj jareldonoj sufiĉe la esencon de nia agado, ili ne bezonas ian informon klarigan pri tio. Por tiuj, kiuj aliĝas kiel tute novaj esperantistoj, ni opinias, ke ni devas sciigi ke ĉiu esperantisto, kiu havas ion diri al siaj samideanoj, kies publikigo estas utila, povas esperi ĝian enpreson en la gazeto. Ankaŭ artikolojn originalajn aŭ tradukitajn, de belliteratura aŭ komunutila enhavo, ni akceptas, se nur ili estas verkitaj en senriproĉa esperanta lingvo, kaj se la spaco de la gazeto permesas ilian enpreson. Malpli longaj artikoloj estas preferataj.

El kaŭzoj facile kompreneblaj ni ne povas pagi la ensenditajn artikolojn.

La redakcio rezervas al si al rajton korekti eble trovitajn erarojn pri la lingva formo de la artikoloj presotaj.

* * *

En la momento kiam "Lingvo Internacia" reviviĝas por komenci, parte sub novaj rilatoj, novan jaron, ni nun prezentas nin ne sen timo kaj dubo, sed tamen samtempe kun firma espero pri sukceso.

En la jaro pasinta ofte ŝajnis al niaj okuloj, kvazaŭ ĉio sin konspirus

kontraŭ ni por malhelpi nian regulan agadon. Se iu aŭ alia el la abonantoj kaj amikoj de nia gazeto, ne sciante la kaŭzojn de malfruigoj kaj similaj maloportunaĵoj, estis malkontenta je ni aŭ koleris pri tio, kion ni bedaŭris sed ne povis rimedigi, ni petas sincere ilian pardonon kaj senkulpigon. Kaj ĉefe kaj laste ni petas, ke en ĉiaj cirkonstancoj ili volu konservadi pura kaj potenca sian amon kaj varmecon por tiu afero, kiu ligas nin unu kun alia, nia sankta ideo, efektivigita de nia majstro, nia alte amata lingvo internacia Esperanto.

La konscio pri la forteco de tiu amo en la koroj de la amikoj de Esperanto inspiras al ni la esperon, ke ĉiuj esperantistoj — ne blindigante siajn okulojn per la eraroj kaj malkapablecoj de tiu aŭ alia persono — faris ĉion laŭ sia povo por konduki nian aferon antaŭen al sukceso kaj venko.

Ankaŭ la konscio pri la forta apogo, kiu de nun staras ĉe nia flanko, faras nin kuraĝa kaj fidema por la venonta tempo.


Ni salutas ĉiujn esperantistojn, dezirante al ili energion en la iniciativoj kaj konstanteco en la laborado.

Esperanto vivu, floru, kresku!

La Redakcio.

Obs. Tiuj abonantoj, kiuj pagis por L. I. 1899 pli multe ol la nunan koston, volu sciigi la Ekspedejon, ĉu ili deziras, ke la troa mono estu resendota, aŭ ke esperantistaj verkoj estu liverotaj por la dirita mono, aŭ ĉu ili alie difinas.

La Ekspedejo de L. I.



Novajoj.

La Klubo Esperantista en Stokholmo kunvenis, sub la prezido de inĝeniero F. Langlet, je la 13-a tago de februaro vespere en la kafejo, 18 Regeringsgatan, kiam estis elektitaj kiel kontrolantoj pri la administrado de l' estraro dum la jaro pasinta s-roj Magnusson kaj Billqvist, kun s-roj Roswall kaj Fischer kiel anstataŭuloj. La Klubo decidis enaĉeti difinitan nombron da ekzempleroj de unu, presita en la jarlibro por 1898 de la "Studentoj kaj laboristoj", artikolo *Neŭtrala lingvo*, kiun verkis s-ro S. Krikortz. La traktato, kiu raportas la historion de la demando de neŭtrala lingvo kaj ĝian nunan solvon per Esperanto, ne estas ricevebla aparta ĉe librovendistoj, sed la Klubo provizās ĝin al personoj postulantaj.

Por akceli la konadon, precipe inter vojaĝantoj, pri la ekzistado de esperantista klubo en Stokholmo, oni decidis, ke la Klubo, laŭ la mezuro kiel tio povos efektiviĝi, elpendigos, per speciale elektita persono, en la plej eminentaj hoteloj stokholmaj kaj en kelkaj aliaj lokejoj sciigojn tuŝante sian ekspedejon por informoj pri la lingvo kaj ĝiaj adeptoj en Stokholmo kaj pri la profitoj por vojaĝantoj komunikiĝi kun la Klubo.

Post ke estis esprimitaj kaj enportitaj en la protokolon kelke da dezirindaĵoj tuŝante la agadon por la plivastigado de la lingvo, la pli oficiala parto de la kunsido estis finita. La plimulto de l' alestantoj restis tamen ankoraŭ dum iom da tempo, por interparoladi en kaj pri la lingvo Esperanto, ĝuante restoraciaĵojn. Oni havis tiam okazon aŭdi la belan, bonsonan idiomon, parolatan kun granda lerteco kaj de sinjorinoj kaj de sinjoroj el la Klubo. Tiaj

vesperoj interparolaj estas aranĝataj, kiel dum la jaro pasinta, en tiu sama loko ĉiumerkrede post h. 8 1/2.

Je la 27 de marto la Klubo denove kunsidis en tiu sama loko. La kontrola raporto estis antaŭlegata kaj al la estraro estas donita plena liberigo de respondeco. Kiel membroj de l' estraro estis reelektitaj s-roj F. Langlet klubestro, P. Ahlberg sekretario, kaj novelektita s-ro A. Roswall kasisto. Supleantoj fariĝis s-rino Krikortz kaj fr-ino Sörensen.

* * *

"Sciigo de l' estraro de la Klubo esperantista en Stockholm" estas folieto hektografita, kiun tiu ĉi Klubo dissendas al siaj membroj. La sekretario s-ro P. Ahlberg transsendis al ni la n:on 5 de la nomita folieto, per kiu estas anoncata la "Libro de l' Humoro" verkita de s-ro Lengyel. Ni ĉerpas el ĝi la jenan diron: "Por komencantoj je la lingvo tiu verko estos sendube aparte akirinda danke al sia multflanka enhavo, kiu pro siaj scenetoj el la gajaj flankoj de l' ĉiataĝa vivo nutras la intereson jam de la unua paĝo ĝis la lasta."

S-ro Ahlberg ankaŭ hektografis kaj elsendis folieton pri sia verko *Stenografio Internacia*, skribita en esperanto per stenografio kun apuda traduko en ordinara skribo.

* * *

Oferoj.

La redakcio ricevis la sekvantan ŝuldskribon:

Mi, subskribinta, konsentas la ideon de Ikso en N:o 11 de "L. I." 1898, kaj promesas donadi por ĝia efektiviĝo, dum la tuta jaro 1899, la 1/200 de mia salajro; la monon mi sendos en du tempoj; unuan duonon de la tuta sumo al 1:a Julio de 1896; la duan duonon al 1:a Januaro de 1900.

Kannus 12:an Marto 1899.

Aug. Th. Laurén.
(Sigelo.)

Dankante por la malavara ofero, ni volus esprimi tian opinion, ke sendube estus plej oportune transdoni al la franca *Societo por la propagando de Esperanto* la administradon de tiu mono sendota al nia redakcio. Tiu ĉi Societo decidis jam klopodi por elmontri la esperantistan aferon en la Ekpozicio 1900 kaj estas la plej kompetenta zorganto. Se la oferintoj nenian rediron havos kontraŭ tiu ĉi nia propono, ni konsilas al ili transsendi, ne al la redakcio, sed al tiu Societo la monon. Tamen ili volu sciigi pri tio ĉi la redakcion de L. I.

* * *

La Ligo de Gastamo.

La sekvantaj personoj sciigis nin pri sia aliĝo al la Ligo de Gastamo: s-ro *T. Ščavin* en Melitopol (gub. Tavriĉeskaja), Ĥarkovskaja, domo de Karpusev;

s-ro ŝtab-kapitano *Klimov* en Kazan, junkerskoje uĉiliŝĉe — ĉe li ĉiu esperantisto, volanta viziti la urbon Kazan en Rusujo kaj sciiganta lin antaŭe, trovas loĝejon, nutraĵon kaj ĉion necesan;

s-ro *Greguar Slucki* en Elisavetgrad volonte donas al ĉiu membro de la Ligo liton, nutraĵon kaj informojn.

* * *

La Libro de l' Humoro.

Ni tre petas ĉiujn, kiuj volos akiri tiun verkon eldonotan de s-ro Lengyel, ke ili tuj antaŭabonu ĝin ĉe la aŭtoro, ĉar li ne presos multe da superflujaj ekzempleroj. Lia adreso estas *Szegvár*, Hungarujo. La kosto 3 frankoj.

* * *

Pri Esperanto parolis. Multaj diversaj gazetoj enhavis, en la pasintaj monatoj, artikolojn kaj notojn pri nia lingvo, pri ĝia disvastiĝo kaj ĝiaj rilatoj. *Franco* estas la lando, kiu ankaŭ en tiu ĉi afero iras antaŭ la aliaj kiel portanto de la standardo. Ni estas kutimigitaj lerni de tie multege da bono — ankaŭ da malbono, sed pri tio ne estas nun la parolo —, kaj en la lastaj tempoj la francoj instruis nin, kiel plej bone kaj efike propagandadi nian lingvon. La frukto de la franca propagando estas, interalie, amaso da artikoloj en la gazetaro. Ni ne havas sufiĉe da loko por doni la nomojn de ĉiuj francaj gazetoj, kiuj parolis pri Esperanto; oni povas legi pri ili en *L'Espérantiste*.

Aparte nomindaj estas la stenografiaj gazetoj. Ni konstatis, ke personoj interesantaj sin por la arto de rapidskribo kaj similaj aferoj, estas sufiĉe inteligentaj kaj sufiĉe preparitaj por ampleksi ankaŭ la ideon, por kiu nibataladas, kun varma intereso kaj sukcesa energio. Ĉar ambaŭ la batalantaroj ne marŝas sur vojo trapaŝita per miloj da antaŭaj irintoj, en kies piedsignoj la irado estas facila kaj povus esti farata kvazaŭ kun la okuloj antaŭligitaj per tuko, — sed ni devas ambaŭ disbarigi mem nian vojon al la celo.

La stenografistoj Düplūajeaj (*Duployé*) venas al ni grandanombre. Ĉiumonate s-ro F. Canet rememorigas pri Esperanto la legantojn de la *Plume Sténographique*. De sia flanko s-ro Paŭlo Garnier, 6, place Guilgot, Nancy, ĉefredaktoro de *l' Sténographe de l' Est* faras en sia ĵurnalo varmegan propagandon kaj entreprenis kurson pri Esperanto.

En *Hispanujo* la *Revista de Taquigrafia y Fonetismo* — redaktoro s-ro Ramon Andreu — donas la gramatikon de Esperanto plenan kaj detalan, afero tiom pli signifa pro tio, ke la hispana lingvo tute ne havas ĝis nun fidindan kaj bonan lernolibron pri nia lingvo.

La organo de la Komuna Ligo de Braŭnsanaj stenografistoj, "*Kurzschriftliche Mitteilungen*", redaktata de D-ro J. Brauns en Hamburg, sciigas en sia marta n:o pri la farita de s-ro P. Ahlberg esperantigo de la stenografia metodo de Brauns, kaj parolas samtempe simpatie pri nia lingvo.

— En diversaj svedaj gazetoj, precipe Stokholmaj, aperis iam post iam notetoj kaj artikoloj pri Esperanto.

Pri la kunvenoj kaj decidoj de la stokholma klubo enhavis notojn kaj sciigojn interalie: *Stockholms Dagblad* la 13. II. kaj 14. II. 1899 (el la lasta n:o ni tradukis kaj presis inter la novaĵoj de tiu ĉi n:o la raporton pri la kunveno havitan je la 13 de marto), *Dagens Nyheter* la 14. II., *Dagen* la 3. III., *Svenska Dagbladet* la 4. III., *Dagens Nyheter* la 28. III., *Aftonbladet* la 28. III. En n:o 101 A de *Aftonbladet* — je la 3 de majo — oni legis artikolon titolitan "Internacia lingvo". Tiu artikolo parolas pri la raporto, prezentita al la Akademio franca de l' sciencoj moralaj kaj politikaj, de s-ro Ernest Naville, asociato de l' Akademiaro franca, kaj pri lia artikolo en la *Revue Suisse* tuŝante tiun saman temon.

— En kelkaj svedlingvaj finlandaj gazetoj sin trovis en la lasta tempo diversaj artikoloj pri Esperanto. N:o 2 kaj 3 de *Uleåborgsbladet* — la 10:an kaj 14:an de januaro — enhavas artikolon rubrikitan: "Kio estas Esperanto?" Tiun ĉi artikolon, sufiĉe longan kaj tre bonegan, verkis nia varma amiko s-ro A. T. Laurén.

— La rusa medicina ĵurnalo *Vrač* (= kuracisto) komencis propagandadi la lingvon Esperanton por medicinaj kongresoj. Ĝi malfermis malgrandan kroniketon sub la redaktado de s-ro K. Ostanieviĉ, kiu alsendis al nia redakcio n:on 11 de la dirita ĵurnalo, por 13. III. 1899, enhavantan ruse verkitan kroniketon kun aparta hektografita aldono en Esperanta traduko.

Priamurskija Vjedomosti, gazeto, eldonata en Ĥabarovsk ĉe la rivero Amur, en Sibirujo Orienta, redonas en sia n:o 263, je 10. I. 1899, la enhavon de artikolo el nia aprila numero de 1898 pri la Japana Bonveno-Societo Kihinkwai. Tiu ĉi traduko estas videble farita de nia amiko s-ro Plusnin, al kiu la publiko ankaŭ dankas la sciigon, ke L. I. estas ĝia fonto.

— La plejmulto de niaj samideanoj konas la monatan ĵurnalon, eldonatan de s-ro E. Lombard en Parizo, la organon de la Societo de Ellernado kaj Korespondado Internacia, kies membroj estas multaj esperantistoj. Tiu ĵurnalo, en kiu oni legis multe da artikoloj verkitaĵoj en esperanto, prenis nun la nomon "*Concordia*" anstataŭ sia ĝisnuna nomo *L'Étranger*. Ni trovas tiun ĉi ŝanĝon tre gratulinda kaj esperas, ke ĝi ĉiam estu beniga por la unuanimeco de la popoloj, kaj ke neniam lando estu por ĝi fremda eksterlando.



Esperanto en "Vokrug Svieta".

Pri Esperanto parolis rusa ĵurnalo "*Vokrug Svieta*" (= ĉirkaŭ mondo) disvastigita, prefere, inter junuloj; kaj jen, nome, kion parolis. La nelonga artikoleto portas la titolon: "Esperanto ĉe pacanta juĝisto". Jen kion ĝi enhavas:

Ĉu aŭdis vi, sinjoroj, ion pri la lingvo Esperanto? Kredeble, jes. Tio ĉi estas tiela sama, kvazaŭ la internacia lingvo; kiel ankaŭ la glora "Volapük". Je ambaŭ tiuj ĉi lingvoj sin okupas la liberaj homoj de senfaro, kaj neniam iom seriozan signifon tiuj ĉi "lingvoj" havas, kaj, malcerte, poste havos. Malfacilaĵojn, do, tamen, ili povas fari ne malmulte. Jen kiel okazis nelonge en urbo Oĉakov danke al "Esperanto".

Unu esperantisto ekŝuldis, laŭ vortoj de ia gazeto, al sia somerloĝa mastrino grandan sumon. Antaŭ forveturo li donis al ŝi kvitancon, skribitan en lingvo Esperanto. La tempo de pagado venis, sed la esperantisto eĉ ne intencis pagi. La mastrino plendis al pacanta juĝisto kaj alportis la kvitancon. La juĝisto, kiel eĉ oni devas atendi, en la lingvo Esperanto legadi ne lernis, kaj tiel ankaŭ ne povas kompreni la enhavon de l' kvitanco. Li ŝuldigis la petantinon alporti al li atestitan precizan tradukon de tiu ĉi mirinda dokumento. La malfeliĉa sinjorino kuradis tra la tuta urbo, vane serĉante specialiston de l' glora internacia lingvo, kiun neniu scias kaj scii volas. Post diversaj serĉoj ŝi trovis ielan kompateman propetanton tuŝante la aferojn, kiu konsentis ŝin liberigi. Li sin turnis al la juĝisto kun peto alvoki la esperantiston.

Tiu venis.

Ĉu konfesas vi vian kvitancon? — demandis lin la propetanto.

— Konfesas! — respondis la ŝuldinto.

— Kio estas ĝia enhavo?

— Pardonu, mi ne povas diri; tri monatoj pasis, kiam mi forlasis Esperanton, disreŝvinte je ĝi, kaj... tute forgesis tiun ĉi lingvon!

Komuna mirego.

— Sed vi ŝuldas? — demandis la juĝisto.

— Ĝin, ĉu scias vi, kiel diri...

La juĝisto ekfinis tiun ĉi aferon per paco, ŝuldiginte la esperantiston pagadi al la petantino po 4 rubloj ĉiumonate. La kvitanco do estis alkudrita al la ceteraj paperoj de la afero, kiel scivola dokumento por posteularo.

Jen kielajn iafoje klopodojn povas fari la Esperanto!

Evitu preni de viaj ŝuldintoj la kvitancojn skribitajn en tiu ĉi lingvo, kiun oni povas tute forgesi post tri monatoj.

K. Boguŝeviĉ.

P. S. — En tiu ĉi sama ĵurnalo estis presita la artikolo "Svedoj en Rusujo", tradukita el la lingvo Esperanto!



De niaj abonantoj.

Pri rusa esperantista gazeto *).

En n:º 9 oni legis interalie pri la propono de s-ro Zakrjevski rilate fondo de la rusa gazeto por propagando de nia kara lingvo. Tiu ĉi propono forte enmetis mian kapon, sed subite mi ricevas leteron de s-ro Briksin el Ranenburgo, kiu skribas al mi pri projekto de s-ro Tenisov, kiu volas fondi gazeton en lingvo Esperanto sub titolo "Stelo Esperanta" sur kolegaj kondiĉoj. S-ro Tenisov havas 500 rublojn kaj esperas, ke veraj esperantistoj helpas al li en tiu ĉi entrepreno.

Se la gazeto elirados en rusa lingvo kune kun paralela traduko en Esperanto, do mi oferas por tiu ĉi celo 60 rublojn. Monon mi sendados post ĉia unu monato po 5 rubloj. Por ke ne estu malfacile por oferantoj mi konsilas fari tiel same.

Per tia maniero mi esperas, ke s-ro Tenisov kolektigos necesan sumon (oni bezonas laŭ vortoj de s-ro Briksin kune 1000 rublojn). Oferantoj ricevos sian monon post 1 januaro 1900 jaro, aŭ laŭ iliaj deziroj povos ricevi profiton. Mi de mia flanko tre petas ĉiujn esperantistojn aparte rusajn, ke volu efektiviĝi tiun ĉi bonan aferon pro intereso de nia komuna ideo.

Kun koraj deziroj

Miĥail Sapoĵnikov,
Agento de Esperanto.

Kaŝiro. Rusujo. 11. XII. 98.



Popolaj portugalaj kantetoj. **)

IX.

Vin ornamas blondaj haroj,
Tre graciaj ili estas;
Ŝajnas oraj fadenaroj
Kie mem la suno nestas!

X.

Se mi Vin ekkonus bone,
Aŭ mi amus Vin, aŭ ne;
Ja nun estas tro malfrue:
Mia kor', suferu! Ve!

XI.

Amatino, ne malkredu,
Malkredanto perdas iam;
Kvankam ŝercas mi kun ĉiuj,
Mia koro — Via ĉiam.

XII.

Se Vi min amadus vere,
El radikoj de la kor',
Vi kun mi parolus nokton,
Tiom ja en ĝi da hor'!

Tradukis: Albano de Magalhaës.



Rebusoj.

La solvon de la rebusoj presitaj en N:º 36 ni prokrastas al unu sekvonta numero kaj ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu al la redakcio la solvon. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la malligoj mem.



*) Ni multe bedaŭras ke tiu ĉi artikolo, pro eraro, ne eniris en N:º 12.

Red.

***) Vidu en la N:º 12, 1896, de "L. I.", p. 220.

Libera loko por anonco. Libera loko por anonco.

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Libera loko por anonco. Libera loko por anonco.

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Libera loko por anonco. Libera loko por anonco.

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Libera loko por anonco. Libera loko por anonco.

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "

Kosto: 5 s. kronoj foje,
kun rabato da 5 % por 3 fojoj,
" " " 7 1/2 " " 6 "
" " " 15 " " 12 "